

# THE BRITISH ESPERANTIST

with which is incorporated



“International Language”

---

53rd Year, No. 624

PRICE - ONE SHILLING  
or Ten Shillings per year, post free

May 1957

---



*Foto : A. A. Bush*

**Partoprenantoj ĉe la 41a Brita Kongreso de Esperanto,  
Weston-super-Mare**



# The British Esperantist

*Publishers :*

THE BRITISH ESPERANTO  
ASSOCIATION, INC.  
140, Holland Park Ave.,  
London, W.11

*Editor :*

CECIL C. GOLDSMITH,  
100, Long Lane,  
Rickmansworth, Herts.

Contributions should be type-written, in double spacing, and sent in by the 20th of the month previous to publication. The Editor reserves the right to refuse, correct, or shorten them. He is not necessarily in agreement with views expressed in signed articles, but accepts responsibility for those unsigned.

Advertisements : £3 per page and pro rata to one-eighth.

## IN THIS ISSUE

	page
Salutvortoj. <i>F. W. White</i> ..	65
Local News .. .. .	66
La 41a Brita Esperanto-Kongreso	67
Work at Weston-super-Mare.	
<i>W. A. Gething</i>	68
Mortoj .. .. .	70
Once more unto the breach. <i>C.C.G.</i>	71
Translation Competition.	
<i>C. D. A. Capp</i>	72
One World—One Language. <i>F.P.</i>	73
New Books .. .. .	74
Esperanto en Radio. <i>J. Brownlee</i>	76
42a Universala Kongreso de	
Esperanto	76
Lanky Ijob. <i>John Masefield</i>	
<i>(A. J. L. Hughes)</i>	77
Ĉu mi lernu novan anglan lingvon ?	
<i>R. Sakowicz</i>	79
Official Notices .. .. .	80

## MALMULTEKOSTAJ LIBROJ

po 1/-, afranko 2p.

**ABC-libro** por junaj infanoj. Nenjo Rimanto. Bildoj de Brian Leslie. 16 p. sur kartono.

**Arboj de la Arbaro kaj Kampo.** Frank Booth. Ilustraĵoj de Edith R. Turlington. 40 paĝoj.

"Tiuĵ 40 paĝoj en malgranda formato estas perleto." *Svenska Esperanto Tidningen.*

**Gaja Leganto per Esperanto.** P. E. Scherwin.

56 paĝoj da ŝercoj, ludoj, kaj aliaj eroj taŭgaj por individuoj aŭ grup-programoj.

**Johano kaj Silvio.** F. F. Betts. 48 paĝoj.

Simpla legolibro por la juna komencanto.

**Londonanidoj.** D. W. Munns. 98 paĝoj.

14-jara knabo priskribis la vivon de geknaboj dum la milito 1939-45.

**Miniaturtoj.** Poemoj originale verkitaj de G. D. Nash. 58 paĝoj, tole bindita.

**Premiaj Romanetoj.** Verkitaj de konkursintoj. 96 paĝoj.

23 mallongaj rakontoj diverstemaj en facila lingvo. Tre bona legolibro.

po 2/-, afranko 4p.

**La Junaj Detektivoj.** J. H. Sullivan. Ilus. Brenda Goodwin. 43 p.

Rakonto en facila lingvo pri kontrabandistoj.

**Komercaj Leteroj.** C. W. Pruisen. 64 paĝoj.

"Mi rekomendas ĝin ne nur al fakuloj sed al ĉiuj." *Malgranda Revuo.*

**Komuna Kantlibro.** H. W. kaj N. Holmes. 64 paĝoj.

33 kantoj kun muziknotoj bone presitaj.

**Somera Universitato, 1948.** 108 paĝoj.

La preleĝoj de la Somera Universitato en Malmö. Tre interesa libro, ne tro teknika, por ĉiu.

Menu ĉe B.E.A.

# The British Esperantist

THE OFFICIAL ORGAN OF THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION

53RD YEAR, NO. 624

MAY, 1957

## SALUTVORTOJ

de nia nova Prezidanto

**R**ESPONDE al invito de la redaktoro, mi kore salutas vin. Nia kongreso ĉe Weston-super-Mare ĵus finiĝis, kaj baldaŭ la lastaj kongresanoj forvojaĝos returne al siaj hejmlokoj, portante kun si belajn memorojn pri tagoj plenaj de intereso kaj refreŝigo.

La vetero, laŭ kutime dum niaj kongresoj, estis tre bona ; la aranĝoj faritaj de la kompetenta komitato absolute kontentigaj ; kaj la etoso ĉe la kunvenoj, de la komenco ĝis la fino, estis harmonia.

Sur aliaj paĝoj en nia gazeto vi legos detalan raporton pri la ĝeneralaj kunvenoj kaj fakaj kunsidoj, kaj certe vi legos pri la decido ree starigi propagandan kason, por ke ni reklamu en ĵurnaloj, veturiloj, kaj aliloke, per taŭgaj kaj frapaj anoncoj, invitojn al homaj ĉie partopreni kun ni en tre ĝinda studado kaj uzado de la internacia lingvo. La entuziasma respondo de la ĉeestantaro per donacoj kaj promesoj montras kiel fervore la afero komenciĝis, kaj nun vi, eĉ se vi ne havis la plezuron ĉeesti la kongreson, povas kapti iom da tiu entuziasmo, kaj havi parton en la antaŭenpaŝo de nia Asocio.

Se vi kaptas la okazon dum konversacio kun homoj en butikoj, veturiloj, ĉe najbaroj, k.t.p., afable enkonduki la vorton *Esperanto*, aŭ iel menci i la laboron de nia movado, mi kredas ke vi surpriziĝos je la nombro de interesataj personoj, kiuj nuntempe estas pretaj aŭskulti en kvieta konversacio pri progreso jam atingita kaj sukcesoj atingeblaj. Eble ankaŭ vi trovos, kiel mi trovas, ke multaj personoj aŭ iam mem havis kontaktojn, aŭ havas parencojn kiuj iam studis nian lingvon. Kaj ofte, se ni afable invitas ilin, ni trovos ke multaj akceptos informfolion, ŝlosilon, aŭ similan propagandilon, kaj poste ekstudos nian lingvon. Ŝajnas al mi, ke multaj homoj bonvenigos ĝuste tian kontakton en amikeco. Almenaŭ, ni provu! Mi mem faros. Ĉu ankaŭ vi ?

F. W. White

## LOCAL NEWS

**Birmingham.** Nova sekretario de la Birminghama Klubo estas S-ro Wilfrid Wharton, 65, Hillyfields Road, Birmingham 23, kiu volonte donos informon pri lokaj aranĝoj.

**Bournemouth.** Diservo okazas en Friends' Meeting House, Avenue Road, la unuan Dimanĉon en ĉiu monato, je 3.30 p.m. Je la 2a de Junio Pentekosta Diservo aranĝita de S-ino M. Key, L.R.A.M.

**Gloucester kaj Somerset Federacio.** La Jarkunveno okazos je 3.0 p.m. Sabaton, la Ian de Junio, ĉe Western College, 1, Cotham Road, Bristol 6. Vizitantoj estos bonvenaj, sed se ili deziras temanĝon ĉe la Kolegio ili antaŭe informu la federacian sekretarion, S-ro P. Willey, 28, Clarence Avenue, Staple Hill, Bristol.

**Lancashire kaj Cheshire Federacio.** La 48a Jarkunveno okazis je la 13a de Aprilo en Rochdale, kaj ĉeestis preskaŭ 80 personoj el 16 urboj. La Jarraporto montras ke estas 15 grupoj en la Federacio, kun tuta membraro 270. La financa stato restas kontentiga malgraŭ kreskantaj elspezoj. Alderman Richard Bland, el Nelson, elektigis Prezidanto. Troviĝas en la federacia regiono multaj samideanoj kiuj ne estas federacianoj, kaj ni kore invitas ilin aniĝi. La kotizo por individuaj anoj estas nur 1/6 jare. Skribu al la sekretario, S-ro F. Parker, 368, Colne Road, Burnley.

**London.** Diservo en Esperanto okazos en la Franca Protestanta Preĝejo, Soho Square, W.1, je 3.15 p.m. la 9an de Junio. Kondukos S-ro Hicks el Bournemouth; solkantos F-ino Gansler. Vi estos bonvena.

The Esperanto class at Chiswick Polytechnic has kept up its attendance very well, and the pupils have made good progress, having worked almost through *Step by Step* in two terms. Eight pupils will sit for the R.S.A. examination Stage I, and four for Stage II. One member, Mr. L. G. Hartridge, has given added interest to the lessons by tape-recordings of Esperanto broadcasts from foreign stations, and arranging reciprocal programmes between this class and the Croydon group. *M.C.B.*

**Orienta Federacio.** La Federacio kunvenos la 1-an de Junio je 3.0 p.m. ĉe Friends' Meeting House, Fonnereau Road, Ipswich, kaj bonvenigos vizitantojn.

**Slough.** Rezulte de rekta peto al B.E.A. por preleganto pri la internacia lingvo, S-ro Gething iris al Beaconsfield, Bucks, por prelegi al 14 anoj de la 'Slough and District Branch of the Pharmaceutical Society' je la 19a de Marto. El la 14 partoprenintoj 5 aĉetis *Teach Yourself Esperanto*, kaj 4 aliĝis al la Populara Koresponda Kurso. Aldone oni anoncis eblon, ke stariĝos propra studrondo pri Esperanto. Ĉu rekordo? *J.W.L.*

**Taunton School.** We have had an active term, beginning with a propaganda meeting in January. We have gained a few recruits and lessons have continued successfully. In March we held a 'Member's Night', short papers being read on various subjects. At this meeting members took part in a 'Demandaro', in which R. D. Anderson was the winner and received the prize of a year's subscription to B.E.A. We hope for a successful summer term, when we have two candidates for the R.S.A. exam. in Esperanto.

## LA 41a BRITA ESPERANTO-KONGRESO

Niaj unuaj vortoj estu gratuloj al la Loka Kongresa Komitato, kaj aparte al la kunsekretarioj, F-ino Barbara Bowell kaj S-ro Guy Tordoff, pro la bone farita laboro. Dum la tuta Kongreso ĉio funkciis glate, kaj ĝi estis unu el la plej ĝuindaj. La urbdomo estis tre taŭga kongresejo, kaj oni plene utiligis tiun fakton. Oni nomis la kunvenĉambrojn laŭ la nomoj de konataj Esperantistoj, ekz. Zamenhof-Halo, Baghy-ĉambro, Oliver-ĉambro, Gething-ĉambro, Goldsmith-ĉambro, k.t.p. En la antaŭhalo estis ekspozicio de Esperantaj poŝtmarkoj kaj poŝt-stampoj kaj de libroj. Sed ni ne scias ĉu ni devas danki al la urbkonsilantaro aŭ al la L.K.K. pro la tre bela vetero en Weston-super-Mare dum la kongreso. Tio donis al ĉio, kaj al ĉiu, feliĉan printempan spiriton. 199 kongresanoj ĉeestis.

Vendredon, la 19an de Aprilo, preskaŭ 200 kongresanoj kunvenis por ĝui la neformalan interkonatiĝan vesperon. Povas esti, ke tio ne estas trafa priskribo de la kunveno, ĉar oni prezentis programon de distraĵoj, el kiuj elstaris la teatraĵo *La Urso*, de Ĉekov, brile prezentita. Granda aplaŭdo estis la danko al la tradukinto kaj reĝisoro, Norman Lock, kaj al la roluloj, S-ino Lock, Ken Alexander, F. Curtis kaj L. Preston.

Sabaton matene okazis diversaj fakkunvenoj kaj aliaj aranĝoj. La Societo de Britaj Esperantistaj Instruistoj (SBET) diskutis la temon 'Esperanto kaj la Plenaĝa Lernanto'; en la Baghy-ĉambro estis Teatro por Infanoj; kaj en la Zamenhof-halo okazis Kurso pri Skandinavaj Popoldancoj, kiu fakte fariĝis danifesto kiu daŭris la tutan tagon. Apartan entuziasmon gajnis "Trojky", en kiu unu viro dancas

kun du virinoj kaj kun gajaj rubandoj. Almenaŭ unu eminentulo dumtempe perdis sian lanan koltukon pro manko de rubandoj! S-ro Colin Trowbridge kun sia akordiono kaj S-ro Merchant ĉe la piano kreis la ĝustan atmosferon, kaj aŭdiĝis multaj komentoj de la ĉeestantoj pri la intenco uzi la dancojn estonte en kunvenoj kaj rondoj.

Vespere okazis oficiala akcepto de la urbestro, kiu manpremis ĉiun. Pli poste li, Konsilanto H. J. Holcombe, J.P., tre afable bonvenigis nin al la urbo, kaj la urbestrino, lia ĉarma filino F-ino Ruth Holcombe, ricevis el la manoj de F-ino Karen Coventry tre belan bukedon. Alderman Heybyrne, kiu studis la lingvon antaŭ multaj jaroj, bonvenigis nin en Esperanto.

Poste komenciĝis la balo, kaj kia balo! Ĉirkaŭ la halo troviĝis seĝoj kaj tabloj, kaj sur tiuj lastaj estis amaso da manĝaĵoj kaj frandaĵoj. Restis sufiĉe da spaco por komforta dancado al muziko ludita de nekutime bona dancorkestro. La ceremoniestro estis nia bonhumora W. A. Gething, kaj mi opinias, ke ĉiu ĉeestanto vere bedaŭris kiam venis la horo por kunkantado de *Auld Lang Syne*.

La Kongresa Diservo okazis Dimanĉe je la 9.30 atm. ĉe Clarence Park Baptista Preĝejo, tre bela preĝejo kun akustiko tre bona. La Gvidanto estis Pastro W. J. Downes, kiu elokvente kaj sincere predikis pri la temo "Potenco por Pligrandaj Faroj" (S-ta Johano 14, v. 1-12). Fariŝ la legaĵojn S-roj Gething kaj Coventry, kaj F-ino Evelyn Wheatley tre bele solkantis. Monkolekto por la Blindula Kaso atingis la sumon £8 17s. 9d.

Raporto pri la Ĉiujara Kunveno kiu sekvis troviĝas sur la posta paĝo.

Preskaŭ ĉiu kongresano partoprenis la tre sukcesan Kongresan Komunan Lunĉon en la Winter Gardens Pavilion, kaj poste okazis kelkaj paroladetoj. Nia nova prezidanto esprimis la gratulojn kaj dankojn de ni ĉiuj al la L.K.K., kaj speciale al S-ro Tordoff kaj F-ino Bowell. Sekvis tion la komuna fotografiĝo, kies rezulto troviĝas sur la unua kovrilpaĝo.

Posttagmeze, samtempe kun kunsido de la Konsilantaro de B.E.A., sed kompreneble en alia ĉambro, F-ino Sybil Lock faris prelegon pri

siaj spertoj en Usono, kiun ŝi ilustris per belaj bildoj.

Lunde la kongresanoj plenigis tri aŭtoĉarojn kaj pasigis la tutan tagon per agrabla ekskurso al Wells, Wookey Hole, kaj Cheddar.

La fina prelego okazis vespere en la Kvakera Domo, kiam S-ro Bertram Potts el Nov-Zelando prelegis pri 'La strangaj kutimoj de la antaŭe primitiva raso en Nov-Zelando', kaj distris nin per anekdotoj. Post la fino resonis la vortoj *Ĝis reveno proksiman jaron en Edinburgo.*

## WORK AT WESTON-SUPER-MARE

The Officers and Members of the Council had little time to enjoy the many attractions of Weston-super-Mare, for as well as taking part in the full Congress arrangements they 'enjoyed' two Council meetings.

The first, on Saturday afternoon, was devoted to consideration of the report of the Publicity Sub-Committee, a task which caused lengthy discussion. Mr. N. Smith put forward a 7-point plan for submission to the Annual General Meeting, but two points—the provision of an 'Advice to Groups Service', and the increase in the price of the Popular Correspondence Course to £1—were accepted by the Council immediately. It was therefore decided to put a 5-point plan to the A.G.M.

At the second meeting, on Sunday afternoon, routine matters were dealt with, which included :

1. The appointment of Mr. A. C. Oliver and Mr. D. B. Gregor to the Council to fill vacancies ;
2. The resignation of Mr. A. C. Oliver from the Committee of U.E.A., and the appointment of Mr. F. Parker in his place ;
3. The re-election of the Executive Committee.

Further, the Council accepted a proposal by Mr. Willan that the Executive Committee should consider the salaries of the Secretary and his staff, and report to the next meeting.

\* \* \*

On Sunday morning the A.G.M. followed the normal course, but there was surprisingly little discussion on the Annual Report and Accounts. It is to be hoped that members had carefully studied these before coming to the meeting, but they had certainly not prepared any awkward or searching questions, and with a brief discussion after hearing the comments of the Hon. Treasurer, they were prepared to move on to the next business.

The Secretary read the list of nominations for Officers and Councillors, and announced that as the number of nominations was the same as the number of places to be filled, no ballot had been necessary, and he declared the following elected :

*President* : Mrs. F. W. White

*Vice-Presidents* : Professor W. E. Collinson, Mr. J. R. Grocott, and Miss V. C. Nixon

*Hon. Secretary* : W. A. Gething

*Hon. Treasurer* : W. H. Coventry

*Councillors, 1957-1960 :*

Dr. C. M. Bean	C. M. Houghton
L. I. Gentle	P. W. Miles
E. R. Holt	R. A. Newland

Mr. Oliver then paid eloquent tribute to Mr. Goodes, who had given splendid service to the Association as Hon. Secretary, until compelled by the pressure of private affairs to ask to be released, and to Mr. Venture, who had taken over the work during the second half of the year. Mr. Oliver also thanked his colleagues on the Executive Committee for their continued support, and finally introduced Mrs. White, the new President.

Mrs. White very modestly expressed doubt as to her ability to carry out the work of President on the high level maintained in the past, but promised to do her best. She paid special tribute to Mr. Oliver for the admirable and dignified way in which he had for two years carried out the duties of President, and Mr.

Coventry underlined this as an officer who had during that time worked in close contact with him. The meeting expressed its appreciation of Mr. Oliver's services by prolonged applause.

An invitation to hold the next Congress in Edinburgh was before the meeting, and was accepted with evident pleasure.

A recommendation of the Council that Mr. E. D. Durrant be elected an Hon. Vice-President of the Association was approved with acclamation. Many members expressed warm appreciation of the valuable work he had done over a long period of years.

The Southern Federation had put forward a resolution to change the Articles of Association in such a way as to make it possible for small Groups of less than ten members to become affiliated; but Mr. Diaz explained that his Federation had decided not to press the resolution, as the Council had undertaken to look



*Foto : B. Laister*

**Evidenta intereso ĉe la jarkunveno**

into the matter. The resolution was therefore, by permission, withdrawn.

The meeting was then adjourned until the evening, when Mrs. White presided over a large assembly, and the main topic was the 5-point plan for publicity sponsored by the Council.

In introducing the plan Mr. N. Smith described the work of the Publicity Sub-Committee, which culminated in the submission to the Council of a detailed report and evaluation of the methods of publicity used in the past. The conclusions reached had led to the formulation of a scheme, which the Council considered to be both desirable and practicable. It could be summarised under five headings :

1. An autumn advertisement in *John Bull* at a cost of £137 ;
2. Autumn advertising in selected national publications which had given good results in the past, e.g. *The Listener*, at a total cost of £160 ;
3. Advertisements in London Underground cars to cost approximately £80 ;
4. Advertisements in university media at a cost of about £20, this being a pilot scheme ;
5. A special membership drive later in the year.

The Council considered that the £400 required would be well spent, and had authorised an appeal to the members to give the fund a good start, as their help and example would undoubtedly be followed by others. Mr. Goldsmith supported the appeal in his usual persuasive manner, and an on-the-spot collection resulted in £63 in cash and £10 in promises, bringing the total in the Advertising Fund to date to about £130—well towards half the total aimed at.

In the subsequent discussions many interesting points were raised, e.g. the fuller use of Mr. Butler, the 'bombardment' of the B.B.C., a drive to get in on Network III, film shows, and the organisation of publicity on a geographical basis.

Mr. Willey, of Bristol, asked if Groups wishing to undertake ambitious local schemes could expect financial help from the Association, but the reply given by the Hon. Treasurer was not very encouraging, for, he explained, the Association needs much higher income than it is now receiving.

Mr. Houghton, as a frequent visitor to 140, Holland Park Avenue, expressed amazement at the amount of work carried on there, and pressed for an increase of staff to enable the Secretary to concentrate on the publicity work for which he had special talents.

The meeting ended at about 9.45 p.m., and the remarks passed in the many little groups of friends made it quite evident that the general opinion of the day's work was highly favourable.

*W. A. Gething*

## Mortoj

**Crofts.** Je la 11a de Aprilo mortis Freeman Wills Crofts, aĝo 77. Li estis mondkonata verkisto de detektivaj romanoj dum pli ol 30 jaroj, kaj la kreinto de la fama detektivo Inspektoro French. Lia verko *Morto de Trajno* aperis en Esperanto en 1948. Crofts estis mem Esperantisto, kaj eĉ sekretario de la 5a Brita Esperanta Kongreso. Li estis membro de B.E.A. preskaŭ de ĝia fondiĝo, kaj ĉiam bone subtenis nian movadon.

**Grout.** Je la 18a de Aprilo en malsanulejo en Ironbridge forpasis S-ino Emily Grout post longa malsano. Si estis dum multaj jaroj agema kaj entuziasma membro de B.E.A. kaj ŝi instruis kaj helpis multajn lernantojn.

*Sinceran kondolencon al la parencoj de niaj forpasintaj kolegoj.*



## ONCE MORE UNTO THE BREACH

If you have read straight through to here you will have read on page 70 that those present at the Annual General Meeting gave an enthusiastic welcome to the proposal for a new advertising campaign in the autumn. The proposals are largely based on past experience, and we have every hope that the results will be still better than last year. So far as practicable all the announcements will appear about the end of August or early in September, so that we may be able to send names of possible recruits to the classes which start in the autumn.

Whether we shall be able to do all as planned depends largely on you, our readers, but we have made an excellent start, as can be seen from this month's list of donations:

	£	s.	d.		£	s.	d.
Previously acknowledged	35	17	7	Preston, G. . . . .	1	0	0
White, Mrs. F. W. . . . .	5	0	0	Osmond, Miss K. . . . .	5	0	0
Coventry, W. H. . . . .	1	0	0	Collected . . . . .	1	6	6
Boulton, Miss M. . . . .	1	0	0	Favell, M. . . . .	10	0	0
Gething, W. A. . . . .	10	0	0	Martin, Mr. and Mrs. H. . . . .	10	0	0
Read, Mrs. E. . . . .	10	0	0	Westmancote, W. F. . . . .	1	0	0
Gregor, Mr. and Mrs. D. B. . . . .	1	0	0	Bowers, Mrs. J. H. . . . .	10	0	0
Saft, S. . . . .	1	0	0	Hardacre, Mrs. L. . . . .	10	0	0
Collis, G. E. . . . .	1	0	0	Anonymous . . . . .	1	0	0
Borrows, W. W. . . . .	1	0	0	Wells, Mr. and Mrs. J. . . . .	1	0	0
Chambers, J. W. . . . .	10	0	0	Gummer, Mrs. C. A. . . . .	10	0	0
Marin, G. . . . .	10	0	0	Bullock, Miss M. . . . .	10	0	0
Abson, Miss E. K. . . . .	10	0	0	Humphries, Mrs. I. R. . . . .	10	0	0
Hicks, A. J. . . . .	1	0	0	Rimanto, Nenjo . . . . .	1	0	0
Bradfordanoj, Tri . . . . .	15	0	0	Langham, W. . . . .	1	0	0
Langtree, Mrs. J. W. . . . .	10	0	0	Simpson, L. . . . .	10	0	0
Baker, D. . . . .	10	0	0	Pensiulo . . . . .	5	0	0
Goldsmith, C. C. . . . .	10	0	0	Gatecrashers, Two . . . . .	5	0	0
Anonymous . . . . .	5	0	0	Gregory, Miss R. . . . .	5	0	0
Allen, F. C. . . . .	10	0	0	Mason, Miss E. E. . . . .	10	0	0
Gentle, L. I. . . . .	5	0	0	Barker, D. D. . . . .	1	0	0
Gander, Mrs. G. L. . . . .	10	0	0	Young, L. V. . . . .	2	6	0
Rich, Miss . . . . .	2	6	0	Netrval, Mr. and Mrs. F. . . . .	1	0	0
Cant, Mrs. L. E. . . . .	5	0	0	Alexander, K. . . . .	1	0	0
Chaundy, Misses E. and P. . . . .	10	0	0	Dodo . . . . .	10	0	0
French, Mr. and Mrs. R. J. . . . .	10	0	0	Middlemast, Mr. and Mrs. A. H. . . . .	2	0	0
Paul, Miss M. . . . .	5	0	0	Miskimmon, W. A. . . . .	1	0	0
Anonymous . . . . .	2	0	0	Scott, D. . . . .	5	0	0
Larrad, Miss M. . . . .	10	0	0	Dowling, Miss N. . . . .	5	0	0
Grocott, Mr. and Mrs. J. R. . . . .	2	0	0	Iu . . . . .	1	3	0
Boulton, Mrs. E. M. . . . .	1	0	0	Sutcliffe, Mrs. E. F. . . . .	2	6	0
Applebaum, J. D. . . . .	2	0	0	Bowell, Miss B. . . . .	5	0	0
Applebaum, Mrs. J. D. . . . .	1	0	0	Kenderdine, J. . . . .	5	0	0
Laurie, Mr. and Mrs. W. B. . . . .	1	0	0	Naylor, J. . . . .	5	0	0
Gething, Mrs. B. . . . .	10	0	0	Razzell, Mrs. N. . . . .	5	0	0
Oliver, A. C. . . . .	10	0	0	Evans, Mrs. S. F. . . . .	10	0	0
Greenwood, Mrs. E. . . . .	1	0	0	Hoyle, J. . . . .	10	0	0
Robotham, Miss O. . . . .	10	0	0	Garraway, Miss E. . . . .	1	0	0
Ely, Mrs. N. . . . .	5	0	0	Swan, Miss A. M. . . . .	1	0	0
Luty, Miss M. . . . .	10	0	0	Hughes, A. J. L. . . . .	2	2	0
Grimes, Miss M. . . . .	5	0	0	Birmingham Esperanto Club . . . . .	3	3	0
Matthews, Miss . . . . .	5	0	0	Gueritte, T. J. . . . .	10	0	0
Head, Mr. and Mrs. W. T. . . . .	2	0	0				
Pilling, Mr. and Mrs. H. . . . .	10	0	0				
Ager, Mrs. A. . . . .	5	0	0				
					£118	14	10

*concluded on next page*

## TRANSLATION COMPETITION

## Result of Test Piece No. 8

This piece was more difficult than those recently set and it was hoped that it would attract some of the more experienced translators. In fact the number of entries was a little less than the number usually received. No competitor sent in a really satisfactory translation and the text that appears below is a 'mosaic'. The most common error was the omission of 'logical tense' after the verb *anoncis* in the second paragraph. In the absence of context *tiam* or *poste* was acceptable in the opening sentence.

The heralds then proclaimed silence until the laws of the tourney should be rehearsed. These were calculated in some degree to abate the dangers of the day; a precaution the more necessary, as the conflict was to be maintained with sharp swords and pointed lances.

The champions were therefore prohibited to thrust with the sword, and were confined to striking. A knight, it was announced, might use a mace or battle-axe at pleasure, but the dagger was a prohibited weapon. A knight unhorsed might renew the fight on foot with any other on the opposite side in the same predicament; but mounted horsemen were in that case forbidden to assail him. When any knight could force his antagonist to the extremity of the lists, so as to touch the palisade with his person or arms, such opponent was obliged to yield himself vanquished, and his armour and horse were placed at the disposal of the conqueror.

From *Ivanhoe*

by Sir Walter Scott

The prize is awarded to Kenneth Wilson of Leicester.

*C. D. A. Capp*

---

*continued from p. 71*

We have to book the spaces required at least two months beforehand, so please send your contribution as early as you can. Remember that if these campaigns are successful this will mean many new B.E.A. members, and consequently less necessity for such appeals in future. We are always looking forward to the time when none will be necessary—and won't that be a surprise when it comes!

C.C.G.

## ONE WORLD — ONE LANGUAGE



That was the theme of the Esperanto Stand at the Hobbies Exhibition arranged by the Library and Arts Committee of the Town Council of Nelson, Lancashire.

When it was first announced—only five weeks beforehand—that the exhibition would be held in the Civic Centre from the 2nd to the 9th March, the local group at once went into action. The group secretary, quite new to the movement, put his professional experience and skill as a window-dresser at the service of the members, and the result was the most beautiful Esperanto Stand in the almost 50 years of experience of the writer of this report.

The background was formed of draped orange-coloured crinkled paper with a cut-out map of the world in white, 5 feet wide, fixed to it. Hanging by invisible threads in front of the map were a large Esperanto star and a pair of clasped hands. Just below was a large globe, borrowed from a local school, and so linked to a small motor out of sight, that when the lights were turned on the globe revolved. Round it, in black letters on an orange

ground, were the words: One World—One Language.

The whole was contained in a large frame, giving the effect of looking at a picture with depth as well as height and width. Amongst the exhibits were a basket of artistically decorated Easter eggs, a doll dressed in national costume, table mats and art books, all sent by Czecho-Slovakian correspondents. There were also on show postcards from various countries, one group consisting of cards with Esperanto postage stamps. In front were *ĝlosiloj* from ten different countries. The free side of the stand was covered with Esperanto periodicals, tourist brochures, and leaflets advertising various air lines. It was easily the most artistic and attractive stand in the whole exhibition.

About one thousand people visited the exhibition—Nelson has a population of 32,000—and nearly 30/- worth of booklets were sold, and a large number of leaflets etc. were given away. A class for beginners has been formed from among those who left their names and addresses.

F.P.



## NEW BOOKS

Order starred books from the B.E.A.,  
others from the addresses given

Verkojn recenzotajn oni bonvolu sendi po du ekzempleroj al la Sekretario, B.E.A., 140, Holland Park Avenue, London, W.11: ne al la Redaktoro.

\***Julian Tuwim: Poeziaĵoj.** Versaĵoj propraj kaj tradukitaj. Eldonejo "Polonia", Varsovio. 130 p. broŝ. Prezo 10ŝ. 6p., afr. 6p.

Niaj Polaj samideanoj rajtas fieri pri sia samlandano Julian Tuwim, kiu mortis en la jaro 1953, ĉar li ne nur estis praktikanta Esperantisto, kiu tradukis poemojn el la Pola lingvo Esperanten, sed li ankaŭ famiĝis kiel Pola poeto. Ĉi tiu kolekto prezentas specimenojn el liaj tradukoj kaj el lia originala verkaro, tradukitajn el la Pola de aliaj—ŝajne li mem ne verkis originale en Esperanto. Inter la nomoj de la tradukintoj troviĝas tiuj de Leo Belmont, Lejzerowicz, kaj Marek Wajsbłum. Kelkaj el la poemoj jam aperis en la Esperanta gazetararo, kaj estas notinde, ke por akiri iujn el tiaj poemoj, la redaktoroj devis sin turni al la biblioteko de B.E.A.

Dum sia vivo Tuwim verkis multege da poemoj kaj, eble pro tio, ne ĉiun poemon en la kolekto la leganto povos taksu juvelo. Tamen sendube la poemaro estas atentinda kontribuo al nia tradukita literaturo, kaj la Asocio de Esperantistoj en Pollando meritas gratulon pro sia entreprenemo.

\***La Fingro de la Diablo** de Nils Christensen. Eldonejo Esperanto A/S, Oslo. 32 p. broŝ. Prezo 2ŝ. 6p., afr. 3p.

Fraŭlino el Oslo trovis en la muro de la katedralo en Hamar stanan fingron (verŝajne votajon). Pluraj homoj, kiuj tuŝis la fingron, aŭ mortis aŭ grave malsaniĝis. Fine ĝi restis inter la vidindaĵoj de la katedralo.

Ĉirkaŭ tiuj detaloj la aŭtoro lasis ludisian fantazion, kaj el tio rezultiĝis ĉi tiu rakonto pri la dek-kvara jarcento, kaj pri iu tiutempa monaĥo.

Malmultaj vortoj ne troviĝas en "Ŝlosilo" (la aŭtoro listigas ilin), kaj tial la libreto estas taŭga por komencantoj.

\***Nuntempa Bulgario.** Monata Kultura Revuo. La unua numero havas 30 paĝojn, formaton 26 × 20 cm., kaj estas ilustrita.

La enhavo paralelas tiun de *Pollando*, krom tio, ke la artikoloj estas ŝajne originale verkitaj kaj oni dediĉas spacon al Esperantaj aferoj, ekz. *Kiel traduki*, leginda artikolo de la konata pioniro, At. D. Atanasov (Ada). Bedaŭrinde, kiel la titolo mem montras, *Nuntempa Bulgario* ne sekvas la bonan ekzemplon de *Pollando* rilate al landnomoj. Abon-ebla ĉe B.E.A. 7ŝ. jare.

\***Paŝo post Paŝo.** Memrorlibro okaze de 10-jara jubileo de Esperanto-societo Bjelovar 1945-1955. Eldonis Esperanto Societo, Bjelovar, Jugoslavio. 62 p. + ilustr. Prezo: 2 rpk.

Ĉi tiu libreto ne nur skizas la historion de Esperanta grupo antaŭ kaj, plejparte, post la milito, sed ankaŭ inkluzivas priskribojn pri la urbo kaj literaturajn kontribuojn. Estas instrue legi pri Esperanta vivo en aliaj landoj. En la jaro 1947 D-ro Lapenna faris du prelegojn en la popola universitato, ĉe kiuj ĉeestis entute mil okcent personoj. Situacio, kiu estas preskaŭ ne okazigebla en nia lando.

**Kagujahime kaj alia.** Japanaj Popolrakontoj. Verkis *Kaji Hirokazu* kaj *Kita Satori*. Ilustris *Katajama Kazuko*. Eldonita 1956 de Esperanta Virina Asocio, Nakacu-hamadoori 2-20 Oojodo-ku, Osaka, Japanujo. 16 p. 18 × 12,5 cm. 4 bildoj.

**La Ĉasteco de Japanio.** El la verkoj de *Mizuno Hiroŝi* kaj *Gotoo Cutomu*. Tradukis aro da samideaninoj. Eldonita 1954 de *El Japanio* Esperanto-Tusinsya, P.O. Kesto 5, Toyonaka, Japanujo. 45 p. 18 × 13 cm. Prezo 4 r.k.

**Kun la Kadavro de l'Edzino** (Travivaĵo en Hiroŝima). Verkis Prof. *Ogura Toyofumi*. Tradukis *Tanaka* - Sadami. Ilustris *Maruki Iri* kaj *Ahamacu Toŝiko*. Eldonita 1954 de *Japania Esperanta Librokooperativo*, Nakacu-hamadoori 2-20, Oojodo-ku, Osaka, Japanujo. 56 p. 18 × 12,5 cm. 8 bildoj. 1 mapo. Prezo 6 r.k.

Konstanta fonto de interesaj libretoj, la Kansai Ligo de Esperanto-Grupoj kun sia Kansai Esperanta Presejo jam havas sian propran katalogon kun 29 titoloj.

*Kagujahime kaj alia* enhavas du mallongajn japanajn popolrakontojn pri feinoj, kiuj eniras la mondon de la homoj. *Kagujahime* fariĝas fama pro sia beleco, kaj *Cuu*, la "alia" de la titolo, pro sia obeemo kaj laboremo. Ambaŭ fine reiras en la ĉielon. La rakontoj estas tre parencaj en spirito al tiuj de "Cindrulino" kaj "Belulino kaj la Besto" en Britujo.

*La Ĉasteco de Japanio* ŝajnas ferakonto por plenkreskuloj. Temas pri usonaj virinĉasantoj en Japanujo. La leganto mem devas decidi, ĉu la japana junulino estas tiel ŝafe naiva kaj la usona soldato tiel lupe voluptema, kiel la libro pentras ilin.

*Kun la Kadavro de l'Edzino* impresas realisme. Ni akompanas inteligentan kaj kleran postvivanton tra la stratoj de Hiroŝima en tiu terura tago, la 6-a de aŭgusto, 1945. Oni facile komprenas, kial la japana registaro aktive protestas kontraŭ la plua eksplodigo de tiaj bomboj, kaj kial la civitanoj de landoj, kies registaroj pretigas la bombojn por eventuala uzo, evitas paroli pri la temo.

*Edward Ockey*

**Bibliografio de Japania Literaturo tradukita en Esperanto. Bibliografio de Scienca Literaturo Esperanta en Japanujo. Bibliografio de Medicina Literaturo Esperanta en Japanujo.**

Ĉi tiuj valoraj bibliografioj estis eldonitaj memore de la ora jubileo de la organizita movado en Japanujo. Prezo ne estas montrita, sed verŝajne ili estas ankoraŭ haveblaj ĉe *Japania Esperanto-Instituto*, Tokio, *Hongo-Motomaĉi* 1-13.

**Facila Semaforo Esperanta** de *Joŝiroo Jamaguĉi*. Eldonas *La Orienta Stelo*, N-ro 4097, *Kamicuruma*, *Sagamihara-maĉi*, *Kanagaŭa* *Greub*, Japanujo. 22 p. broŝ. Prezo: 3 rpk afrankite.

La sistemo diferencas de tiu, kiun oni lernas en la skolta -ina movado en tio, ke du flagoj montras silabon kaj ne alfabetan literon. Troviĝas signoj por interpunktado kaj aliaj kromsignoj. Aldono klarigas kiel la sistemo estas aplikebla al naciaj lingvoj.

**Prospektoj :**

**La Monaĥejo Ivan Rilski.** Plene ilustrita kun teksto tute en Esperanto pri la antikva monaĥejo, kaŝita en la montaro Rila. Havebla ĉe "Balkanturisto", Sofio, Bulgaraĵo.

**Kreuth.** Ilustrita, Germana kun aparta Esp. teksto. Havebla ĉe *Gemeindliches Verkehrsamt Kreuth bei Tegernsee* (Bayern), Germanujo.

**Billige Danske Rundture** (Rondvojaĝoj en Danlando). Ilustrita, Dana kun Esp. folieto. Havebla ĉe *S-ro A. P. Olesen*, *Vestergade 90*, *Horsens*, Danlando.

**Verona.** Gvidfolio 8-paĝa pri la urbo, kaj poŝtkarto pri la 59a Internacia Foiro de Verona (10-19 Marto 1957). Haveblaj de Esperanto Grupo ĉe *S-ro Rag. Americo L. Reni*, *Via Rovereto, 6*, Verona (Italujo).

**Air France.** La Plej Granda Aerliniaro en la Mondo. Kvarpaĝa informilo, eldonita okaze de la 42-a Universala Kongreso de Esperanto — *Marseille*. Senpage ricevebla ĉe *Air France, 9, Avenue Général-Leclerc, Marseille (3ème)*, Francujo.

---

**Trovitaj ĉe la kongresejo :** du paroj da gantoj. Rehaveblaj ĉe *S-ro G. Tordoff*, 82, *Pendennis Park*, *Bristol*, 4.

# ESPERANTO EN RADIO

## Programoj kutime riceveblaj en Britujo

Lundo :	22.40–22.57	Hilversum, aŭ 298 aŭ 402 m. Nur la unuan London de la monato. N.C.R.V., Schuttersweg, 8.
Mardo :	11.55–12.00	Bern. 48.66, 31.46 m. Neuengasse, 23.
	17.35–17.40	Bern, same.
	17.55–18.10	Romo. 50.34, 41.24, 30.90 m. Casella postale 320.
	19.00–19.15	Stockholm. 26.10, 19.90, 33.6 m. I.B.R.O., Poŝt-fako 822 (nur la lastan Mardon de la monato).
Merkredo :	17.55–18.10	Romo—kiel Marde.
	22.50–22.58	Hilversum, aŭ 298 aŭ 402 m. V.A.R.A., Heuvellaan 33.
Ĵaŭdo :	11.55–12.00	Bern—kiel Marde.
	17.35–17.40	Bern—kiel Marde.
	22.45–23.00	Zagreb. 264 m. Radio Zagreb, Jugoslavujo.
Vendredo :	17.55–18.10	Romo—kiel Merkrede.
Sabato :	22.15–22.22	Hilversum, aŭ 298 aŭ 402 m. K.R.O., Emmastraat 52.
Dimanĉo :	23.35–24.00	Bilbao. 265 m. Radio Bilbao, Hispanujo.

Horoj, laŭ G.M.T. Adresoj supre, al kiuj oni skribu pri ricevo—OFTE !

Aldonu unu horon pro B.S.T. Sendu raportojn al S-ro J. Brownlee, 11, Shaftoe Crescent (nova adreso), Hexham, Northumberland.

## 42a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

MARSEILLE, 3-10 Aŭg. 1957

**Aliĝiloj** haveblaj ĉe B.E.A., sed bonvolu sendi afrankon.

### Nunaj kotizoj :

	ŝ.	p.
Kongresano .. ..	62	0
Edzino de kongresano ..	31	0
Junulo ne pli ol 20-jara kaj studentoj .. ..	21	0

**Rabatoj :** Plenaĝa aliĝinto, kiu estas individua membro de U.E.A., rajtas rabaton de 8ŝ., kaj edzino de individua membro la duonon de tiu sumo.

**Kongresa Libro** estos sendata al ĉiu kongresano fine de Junio.

**Infana Kongreseto.** La L.K.K. rekomendas al infanoj de 6 ĝis 13 jaroj, kiuj parolas Esperanton, partoprenon en la 2-a Internacia

Infan - Kongreseto, kiu dumtage pensione zorgos kaj distros ilin.

**Lasta limdato.** Post la 30a de Junio ne plu estos akceptataj aliĝoj al la Kongreso. En la kongresejo ne ekzistos tagaj kartoj.

**Fervoja rabato.** La Francaj fervojoj donas 20% rabaton al kongresanoj, valida de la franca landlimo inter la 29a de Julio kaj la 15a de Aŭgusto.

**Aŭtomobilistoj.** Eksterlandaj aŭtomobilistoj ricevos en Francujo ĝis 25 litroj da benzino ĉiutage.

**Statisko.** Komence de Aprilo aliĝis al la Kongreso pli ol 1,000 kongresanoj el 33 landoj.

**Kongresadreso.** 32 Cours d'Estienne d'Orves, Marseille.

John Masefield

## LANKY IJOB

kun afabla permeso de la aŭtoro tradukita de A. J. L. Hughes

“Lanky” Ijob estis mallaborema maristo de Bristol, famaĉa tra la sep maroj pro lia dormemo. Multe da ŝipestroj laboris por lia plibonigo, sed neniel iam sukcesis, nek havigis de li pli da ĉiutaga laboro ol tio de heliko. Eblas, ke li estus pli maldormema, se li ne naskiĝus dotita de epiplono\*, kiu certigis lin, ke surmare li neniam dronos. Oftege, li falis de la rigilaro, aŭ de la remparo, kiam li revis dum sia labortempo aŭ vaĉo. Sed liaj ŝipestroj ĉiam haltigis la ŝipon por lin kolekti, kaj al ĉiu li kompleze esprimis kortuŝan dankon, kiu, tamen, finiĝis en ronko je la naŭa, deka vorto.

Iutage Ijob sterniĝis ĉe bolardo sur la kajo de Bristol, kiel eble plej profunde dormanta. Dum la antaŭtagmezo li ekdormis, kaj, kiam li vekigis, la suno estis subiranta. Rekte antaŭ li, alligata al la kajo, troviĝis la plej belega ŝipo, kiu iam tranĉis akvon.

Ŝi havis malakrajn antaŭpartojn, kaj stumpan formon; en la antaŭparto troviĝis ega kastelo, kaj poste ne malpli ol kvin poboĵoj, unu super la alia. Ekster ŝiaj remparoj ekvidiĝis koloritaj ekranoj, tute skarlataj kaj bluaj kaj verdaj, sur kiuj estis pentritaj ŝipoj, kaj brulantaj birdoj, kaj sinjorinoj vestitaj per ora tolaro. Super ĉio troviĝis vico da hamakoj, kovritaj de blanka peco de damasko; kaj ĉiu pobo havis siajn remparojn; kaj la siteloj estis verdaj; kaj en ĉiu sitelo kreskis rozfloroj. La mastoj estis el ebono, kaj la mastringoj el argento. Kaj la ferdekoj estis ellaboritaj de pargeto, el verdaj kaj blankaj lignoj; kaj la kalfatrismo estis kalfatrinta la sulkojn per ruĝa gudro, ĉar li estis vera majstro en sia

metio. Kaj la kajutoj estis ĉiuj gloraj vidaĵoj pro skulptaĵoj, kaj dolĉodoroj simile kiel oranĝoj. Tute malantaŭe troviĝis stango el eburo, skulptita en Ĥinuĵo, kiu subtenis grandegan oran lanternon; sub la lanterno flirtis granda blua standardo.

Ijob, do, rigardas la ŝipon, kaj li opinias, ke li neniam vidis ion pli belan; sekve, li eniras per la ponteto, kaj sur la ferdeko li vidas etan ŝipestron kiu portis rondan, ruĝan, plumhavan ĉapelon, kaj arĝentan fajfilon.

“Bonan tagon, Ijob,” diris la ŝipestro; “kaj kiel vi ŝatas mian ŝipon?”

“Sinjoro,” respondis Ijob, “Neniam mi vidis pli belan.”

Do, la ŝipestro kondukis Ijob antaŭe, kaj donis al li mordajon en la antaŭkastelo; tiam, li kondukis lin posten, kaj donis al li trinkaĵon en la granda kajuto.

“Kaj, Ijob,” diris la ŝipestro, “Kiel vi emus veturi sur ĉi tiu bela ŝipo?”

Ijob, tute viglega pro la beleco de la ŝipo, respondis—

“Ho, Sinjoro, tion mi ŝategus; tiel ŝi estas belega!”

Kaj tuj Ijob vidis la etan ŝipestron fajfanta, kaj anaro de etaj ŝipanoj, portante, ili ankaŭ, ruĝajn ĉapelojn, kuris supren, kaj malfirmigis la haŭserojn. Kaj la ŝkotoj propramove ĝustiĝis, kaj la ŝipo sin turnis for de Bristol, kaj jen Ijob apud la komandejo balancanta la kapon. La vento pelas la ŝipon kiel cervon, jam mejlon for de la kajo, sur la oceano.

“Via estos la triborda vaĉo,” diris al li la eta ŝipestro, “Kaj, ve al vi, ‘Lanky’ Ijob, se ni ekvidos vin dormanta dum via vaĉo!”

\* angle = *caul*.

Nu, Ijob neniam sciis multe pri tiu ekskurso, kiun li faris kun la ruĝĉapelaj etuloj ; sed li ja memoris, ke unufoje li ekdormis, kaj ke ili pikis lin per kudriloj. Kaj li sciis, ke duafoje li ekdormis, kaj ke ili trapikis lin per ruĝvarmaj fajrstangoj. Kaj li sciis, ke triafoje li ekdormis, kaj—“Ve al vi, Ijob,” oni diris ; kaj ili metis lin je la busprita fino, peco da pano en unu mano, kaj trinketo da akvo en la alia. “Kaj restu vi tie, Ijob,” oni diris, “ĝis vi falos en la maron kaj dronos.”

Efektive kortuŝa estis lia stato ; ĉar, se li rigardus posten, tie staris la etuloj pikantaj ; se li rigardus antaŭen, li kapturiniĝis ; se li rigardus malsupren, li naŭziĝis, kaj, fine, se li rigardus supren, li blindiĝis. Do, li rigardis ĉiuvoje samtempe, kaj fermis la okulojn, kaj tuj falis de sia sidstango, plaŭdante en la ondaron ĉirkaŭ la steveno.

“Nu, mi ekdormu,” li diris al si mem, “ĉar ne ekzistas akvo tiel malseka, ke ĝi dronigus min.” Kaj fakte li ekdormis, kaj longtempe li drivis sur la maro.

Nu, kiam li estis longtempe flotinta, li vidis ŝipegon, nigran kiel peĉo, ruĝvelan, kiu ekglitis preter li en la eklumiĝo. Kaj, kvankam li havis epiplonon, kaj, tial, ne povis droni, li sufiĉe ĝojis, vidinte ĉi tiun ŝipon ; kaj eĉ pli ĝojis, kiam ŝi ruliĝis, kaj li sukcese trafis la\* brasojn.

La ŝipo naĝfalis sur lin, kaj li trafis la ĉefbrason, kiam ŝi klinis fordeventen pro ekblovo. Kaj, utiligante la alventan rulon, kaj forte sin levinte, li fine atingis la ferdekon, antaŭ ol li ree ekdormis.

Grimpante la ŝipflankon, li ekvidis, ke ŝi estas dense kovrita de anatifoj, † kaj ke ŝi havas kvardek savboatojn, ĉiu balancanta de davitoj el eburo.

Sed, kiam li vekigis, jen ! La ŝipo estis virprovizata de nenio, krom

\* angle = braces, guys.

† angle = barnacles.

grandaj ratoj, kiuj ĉiuj portis blujn vestaĵojn, simile kiel ŝipanoj, kaj nazgraŭlis dum ili ĝustigis la velstangojn. Kaj, tuj vidinte “Lanky” Ijob, ili ĉirkaŭis lin, grincigante la longajn, flavaĉajn dentojn, kaj kirlante la vilajn vangharojn. Kaj ilia nombro estis nekalkulebla, kaj ĉiumomente ŝajnis al Ijob, ke boato alvenas, alportante ĉiam pli da ili, ĝis la ferdeko iĝis konfuzplektaĵo pro iliaj vostoĵoj.

Ses, sep el ili ekkaptis lin, kaj trenis lin malantaŭen, kie balanciĝis ega direktilo el ostoj, kun rudristo ambaŭflanke, sidigantaj sur pezaj oraj seĝoj. Ĉi tiuj rudristoj estis duone homoj, duone ratoj ; ili estis vilaj, same kiel ratoj ; ili estis grizaj, same kiel ratoj ; iliaj okuloj aspektis same, kiel tiuj de ratoj ; sed iliaj mensoj estis homaj, kaj ili estis la estraro de ĉi tiu barko, kaj plene teruraspektaj ili estis.

Nu, kiam li vidis ĉi tiujn teruraĵojn sidantaj tie, Ijob eksciis, ke li eniris la flagŝipon de la ratoj, kies boatoj ensvarmas en ĉiu maro, por savi la ratojn, tiam, kiam ili forlasas la alfundirontajn ŝipojn. Kaj li kriegis, kaj pugnofrapis la bandon kiu tenadis lin, kaj en la maron li saltegis.

Li drivis unu tagon kaj unu nokton, ĝis la korpo kovriĝis de salfendoj ; kaj li alteriĝis ĉe Avonmouth, post semajno de foresto.

Sed ĉiam poste, Ijob estis vigla maristo, tiel netega junulo, kiel oni povus ie trovi.

---

**The language that Hitler banned** is enjoying a boom. Under this title in large letters the *Kensington Post* of April 19th contained a very long report of an interview between its representative and Mr. J. W. Leslie. It ran to 40 column inches, and included a picture of Mr. and Mrs. Leslie.



Roman Sakowicz

## Ĉu mi lernu novan anglan lingvon ?

**A**NTAŬ sesdek jaroj, kiam mi estis juna lernanto de unu el la gimnazioj en Peterburgo, unufoje mi sidis kun mia patro en restoracio kaj tagmanĝis. Proksime de ni sidis sinjorino kaj sinjoro, atendante iun alian. Fine venis alia sinjoro, fremde aspektanta, kaj la sidanto prezentis al la alveninto sian inon, dirante en lingvo nekonata al mi: "My wife." Poste ili komencis paroli en tiu nekonata lingvo, kaj mi demandis mian patron. "En kiu lingvo ili parolas?" "En la angla," estis la respondo.

La unuan fojon mi aŭdis tiun lingvon kaj ĝi plaĉis al mi, kaj laŭ mia peto mia patro baldaŭ aĉetis anglan lernolibron. Tiu estis terure enuiga multkajera elpensajo de iu S-ro Langenscheid, kiu kun germana precizeco penis lernigi min malŝati la studobjekton, kaj fine mi kaŝis la lernolibron. Tamen, ĝis nun mi memoras la historion de avara S-ro Scrooge, kio komenciĝis en la unua kajero per la vortoj: "Marley was dead, to begin with." Mi ne povis kompreni kial tiu "with" estas en la fino de la frazo, sed kiam poste, lernante germanan lingvon, mi eksciis ke ofte oni devas atente serĉi la verbon en la fino de longa frazo, mi tiam komprenis ke naciaj lingvoj ne estas idealaj. Baldaŭ mi okaze trovis malgrandan libron de mistera "Doktoro Esperanto", kaj komparante lian genian verkon kun naciaj lingvoj mi fariĝis por tuta mia vivo lia fidela adepto.

Sed mia simpatio por la angla lingvo restis, kaj iom post iom, legante antaŭ 50 jaroj la avon de nuna *The British Esperantist* (ĝi iom alie tiam aspektis!), mi komencis alkitimiĝi al la angla ortografio.

Kaj nun, antaŭ kelkaj tagoj, en unu varsovia gazeto, mi legis la novaĵon kiu min ekskuis: temas pri testamento de fama G. B. Shaw kaj pri . . . la angla alfabeto. En la gazeto estas presita, ke en londona juĝejo nun estas diskutata parto de tiu testamento, kiu tuŝas ŝanĝon de la angla alfabeto, kiu nun havas 26 literojn, kaj laŭ Shaw devus havi 40! Shaw proponis, ke esplorado de lia projekto estu bazita sur matematiko kaj statistiko, sen akcepto de opinio de "profesiaj fonetikistoj, etimologoj, k.t.p.", inkluzive "reformistoj de ortografioj kiuj uzas la universalajn lingvojn." Mi havas nenion kontraŭ la elstreko de "hejmaj" reformistoj, kiuj ankaŭ svarmas en nia movado, sed mi ne povas subteni lian proponon ŝanĝi la anglan alfabeton, al kiu mi alkitimiĝis, ne konante bone la lingvon. Sed ne nur mi! En Polujo nun multaj gejunuloj lernas (sen sukcese, kiel mi antaŭ jaroj!) la lingvon de Dickens, kaj ili ankaŭ alkitimiĝas al la angla alfabeto; ĉu ili komprenos en iu nova amromano vortojn *tu lav anstataŭ tiel bone konataj de jarcentoj to love*?

Mi esperas, ke la juĝejo en Londono aŭskultos ankaŭ niajn voĉojn, kaj konservos la alfabeton de *old merry England*.

---

**Internacia Polica Ligo.** S-ro Aŭgust Weide, Eggerstedtstr. 41, Hamburg-Altona, Germanujo, klopodas pri la restarigo de I.P.L. Li dissendis unuan bultenon kun la nomoj de 100 Esperantistaj policistoj en diversaj landoj, el kiuj 11 estas en Britujo.

## THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION, Inc.

### OFFICIAL NOTICES

Hon. President : B. Long, B.A.

President : Mrs. F. W. White

Hon. Secretary : W. A. Gething, B.Sc.

Hon. Treasurer : W. H. Coventry, F.B.E.A.

Hon. Education Secretary : M. C. Butler, M.R.S.T.

Secretary : J. W. Leslie, F.B.E.A.

Registered Office : 140, Holland Park Avenue, London, W.11. Tel. : PARK 7821

Hours : Weekdays 9 a.m. to 5 p.m. ; Saturdays 9 a.m. to 12 noon

### NEW JUNIOR MEMBERS

Anderson, R. D. *Taunton*  
 Bird, Miss C. D. *New Barnet*  
 Munford, J. *Cambridge*

### NEW MEMBERS

Allen, F. C. *Abergavenny*  
 Bennell, E. J. *Salford, 6*  
 Fulford, Miss D. M. *Bristol, 6*  
 Goodwin, Mrs E. *Leicester*  
 Hopkins, T. H. *Keston*  
 Hurgon, Rev. R. K. *London, N.W.3*  
 Mauger, Mrs. I. R. *Welwyn Garden City*  
 McKinley, Mrs. N. *Tynemouth*  
 Pathamaphas, V. *Dhonburi, Bangkok*  
 Percy, Mrs. R. M. *Edinburgh, 9*  
 Tarasiewicz, S. *Chessington*  
 Wright, Miss R. *Thornton, Leics.*

### APPLICATION FOR FELLOWSHIP

White, Mrs. F. W. *Guildford*

### B.E.A. EXAMINATION SUCCESSES

#### Elementary by Correspondence

Mills, Miss L. M. *New Plymouth, N.Z.*  
 \*Wagstaff, Mrs. D. B. *New Plymouth, N.Z.*  
 Wagstaff, W. L. *New Plymouth, N.Z.*

#### Advanced—Written Part

\*Weber, E. J. *Auckland, N.Z.*

#### Schools Examination

Patching, R. *Rochester*

\* Denotes a candidate who has passed with Distinction.

### DONATIONS TO GENERAL FUNDS

Previously acknowledged : £48 6s. 7d.

Under 2s. 6d. : 1s. 0d.

5s. 0d. : Miss P. D. James, J. Naylor.

10s. 0d. ; Mrs. A. Colyer, Mrs. N. Davie.

18s. 9d. : Anon.

20s. 0d. : T. Walker.

£1 10s. : H. J. Bridger, T. E. Cottar.

£2 10s. : E. C. Hilder.

£4 : C. M. Houghton.

£10 : T. J. Gueritte.

Total to 24th April, 1957, £71 6s. 4d.

### COUNCIL MEETINGS

#### Weston-super-Mare

20th April, 1957

*Present* : The President (in the Chair), the Hon. Treasurer, A. A. Ager, H. W. Allen-Smith, J. D. Applebaum, C. Bardsley, Miss M. Boulton, Mrs. L. E. Cant, G. E. Collis, A. Diaz, L. I. Gentle, W. A. Gething, J. R. Grocott, A. J. Hicks, E. R. Holt, C. M. Houghton, W. A. Miskimmon, F. Netrval, Miss V. C. Nixon, F. Parker, N. R. Smith, Miss C. Waller, Miss E. M. Wheatley, Mrs. F. W. White, F. Willan, Miss E. Woodget.

*In attendance* : The Secretary and the Editor of the Journal.

21st April, 1957

*Present* : The President (in the Chair), the Hon. Treasurer, the Hon. Secretary, A. A. Ager, H. W. Allen-Smith, J. D. Applebaum, C. Bardsley, Miss M. Boulton, Miss B. Bowell, Mrs. L. E. Cant, Miss E. Chaundy, G. E. Collis, A. Diaz, Rev. W. J. Downes, L. I. Gentle, D. B. Gregor, J. R. Grocott, A. J. Hicks, E. R. Holt, C. M. Houghton, W. A. Miskimmon, F. Netrval, Miss V. C. Nixon, A. C. Oliver, F. Parker, N. R. Smith, Miss I. Tritton, Miss C. Waller, Mrs. G. E. Wells, Miss E. M. Wheatley, F. Willan, Miss E. Woodget.

*In attendance* : The Secretary and the Editor of the Journal.

Report on page 68.

J. W. LESLIE, *Secretary.*

---

On April 19th the *Kensington News* contained a report of an interview with Mr. and Mrs. Potts about their world tour, under the title: *La Viro iras Tutmondon.*

# SMALL ANNOUNCEMENTS

2d. per word. Minimum 2s. per issue. Prepaid

Copy must be received at the B.E.A. Office by the 20th of the month

**Glorata estu mia Sinjoro**, ĉiutage Li zorgas pri ni; Dio estas nia savo. Ps. 68. 19.

**Karola kaj Reto Rossetti** sciigas sian novan adreson: 28, Redditch Road, Alvechurch, Worcs. Tel. (Birmingham) Hillside 2234.

**Filatelaj ekzempleroj de Esperantaj Kongres-stampoj** (antaŭ 1950), kaj korespondantoj en Armenia kaj Georgia bezonataj de John Collard, 3, Westwood Mansions, Shrubbery Road, Weston-super-Mare.

**26-jara trovi por vi** junajn korespondantojn en multaj landoj, precipe Ĉeĥoslovakujo, Sovetunio, Japanujo, Pollando, Jugoslavio, Okcidenta kaj Orienta Germanujo, Hungarujo, kaj Bulgarujo. Skribu tuj, kun detaloj pri vi kaj viaj deziroj, al: Esperanta Grupo, School House, Taunton School, Somerset.

**26-jara asistanto** de kemia fako, kiu interesigas pri fotografio, scienco, arto, literaturo, deziras interŝanĝi fotojn, il. poŝtkartojn, gazetojn, k.c. Adreso: Staŝonok, V.D., Poste Restante, Ĉefpoŝtejo, Minsk, U.S.S.R.

**Mondo senmilita**: petu senpagan folieton kiu pritraktas ĉi tiun temon. BM/JONIB, London, W.C.1.

**The Workers' Esperanto Movement** combats national prejudices and false patriotism. Write for free copy of "The Worker Esperantist" to 27, Argyle Road, Ilford, Essex.

**The League of Catholic Esperantists.** Details from Hon. Sec., Norman W. Vigar, 43, Defrene Road, London, S.E.26.

**Socialist Leader**, 48, Dundas Street, Glasgow, C.1. Single copies 3d.: 12 weeks 4s.: 24 weeks 8s.: 52 weeks 15s. 6d. Complete *Esperanto* article in every issue.

**Balham Esperanto-Grupo** kunvenas regule la unuan ĵaŭdon de ĉiu monato ĉe 48, Ormeley Road, London, S.W.12 (apud Balham subtera fervojstacio kaj kontraŭ Balham Poŝtoŝticejo en Balham High Road). Ĉiu estas bonvena.

**Liberpensuloj Esperantistaj** estas invitataj aliĝi al Brita Liberpensula Esperantista Asocio (provizora titolo). Sendu 5/- al Sekretario, S-ro G. L. Dickinson, 21, Gribble Road, Liverpool, 10.

## NOW IS THE TIME for you to give this to your Esperantist friends

**THE** British Esperanto Association consists of men and women who believe that Esperanto is one of the important factors of modern progress; that by its aid international communication of every type is facilitated. Esperanto is intended not to replace the national tongues but, acting as a second language for people of all nations, to facilitate both written and spoken communications between them. **YOU** are invited to co-operate in spreading a knowledge of Esperanto by completing the following application for membership:—

SUBSCRIPTION: 20/- per annum. Persons joining after 1st July may pay 10s. to end of current year—those under 21 may join as Junior Members at half rates.

TO THE SECRETARY, THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (INC.),  
140, HOLLAND PARK AVENUE, LONDON, W.11.

I, .....

herby apply for membership of THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (Inc.) and enclose the first Subscription of.....

Signature .....

Nationality..... Rank, Profession or Occupation.....

Address .....

Date..... Age (if under 21).....



**THE LONE TREE  
OF THE SAHARA**

Esperantists who would like to have a free gift of some Lone Tree Stamps for their international correspondence are invited to send a stamped, addressed envelope to the Secretary :

**The Men of the Trees,  
West End, Southampton**

### **NOVAJ AŬTOMOBILAJ INSIGNOJ**

faritaj el muldita bronzo, kun la vortoj "Esperanto Lingvo Internacia" en rubando ĉirkaŭ la verda stelo : kun aŭ sen fiksa flango ("lango"). Diametro  $2\frac{1}{2}$  coloj. Tre taŭgaj (sen la lango) ankaŭ por antaŭpordoj ; kaj taŭgaj kiel donacoj.

Malkara prezo : 15 ŝilingoj, afrankite

**Mendu rapide, ĉe B.E.A.**

### **FOR LEISURE AND LIBRARY**

**Tri Verkoj de Volter (Voltaire) :** Kandid aŭ la Optimismo ; Zadig aŭ la Destino ; Senartifikulo. Trad. de E. Lanti. "*La stilo de la tradukisto estas majstra . . .*" 16ŝ. 6p., afr. 1ŝ.

**Teatro en Societo.** 84 paĝoj (El Slovenujo). "*La lingvo ĝenerale estas simpla kaj flua . . .*" (K. Alexander) 4ŝ., afr. 3p.

**La Malprudenta Scivolulo,** novelo de Don-Kiĥoto, trad. de Luis Hernandez (ilustrita). Fidele reproduktas "*la precizan signifon de la vortoj de Cervantes . . . alloga aspekto de la libro faras ĝin bona propagandilo*" (E. P. Ockey) 4ŝ. 6p., afr. 3p.

**Mendu ĉe B.E.A.**